

eLIBRO

August Strindberg

Fraŭlino Julie

Naturalista tragedio



INKO

August Strindberg

FRAŬLINO JULIE

Naturalista tragedio

El la sveda tradukis

Paul Nylén kaj S. E. Krikortz (1908)

Lingve reviziis Franko Luin (2001)

eLIBRO

Aranĝis: Franko Luin

ISBN 91-7303-081-3

inko@omnibus.se

<http://www.omnibus.se/inko>

INKO · SE-13542 TYRESÖ · SVEDIO

FEBRUARO 2001

Personoj

Fraŭlino Julie, 25—jara

Jean, lakeo, 30—jara

Kristin, kuiristino, 35—jara

La agado: en la kuirejo de la grafo, somermeza nokto

Scenejo

Granda kuirejo, kies plafonon kaj flankajn murojn kaŝas drapiroj kaj sufitoj. La malantaŭa muro direktiĝas malrekte internen kaj supren laŭ la scenejo, de maldekstre; sur ĝi maldekstre du bretoj kun vazoj kupraj, bronzaĵ, feraĵ kaj stanaj; la bretoj estas garnitaj per papero, krispita; iom dekstre tri kvaronoj de la granda arkaĵa elirejo kun du vitraj pordoj, tra kiuj oni vidas fontanon kun Amoreto, florantajn siringojn kaj elstarantajn piramidajn poplojn.

Maldekstre sur la scenejo la angulo kun granda kahela kameno kun parto de ĝia kapuĉo.

Dekstre elŝoviĝas unu fino de la manĝotablo, el blanka pinligno, de la servistaro kun kelkaj seĝoj.

La kameno estas ornamita per foliriĉaj betulbranĉoj; la planko estas surŝutita per juniperaĵo.

Sur la fino de la tablo granda japana spicoskatolo kun florantaj siringoj.

Glaciŝranketo, tablo por purigi porcelanon, lavotablo.

Granda antikviĝinta sonorigilo super la pordo kaj elbuŝiganta parolotubo sur la maldekstra flanko de la pordo.

Kristin staras apud la kameno kaj fritas en fritpoto; ŝi estas vestita en hela kotonvesto kaj havas kuirejan antaŭtukon antaŭ si; Jean eniras, vestita en livreo, portanta paron da grandaj rajdbotoj spronhavaj, kiujn li metas for de si sur videblan lokon sur la planko.

Jean Ĉi vespere fraŭlino Julie estas denove freneza; tute freneza!

Kristin Nu, ĉu vi estas ĉi tie nun?

Jean Mi akompanis la grafon al la stacidomo, kaj revenante preter la draŝejo, mi eniris kaj dancis, kaj tiam mi vidis la fraŭlinon gvidanta la dancon kun la arbargardisto. Sed kiam ŝi ekvidis min, ŝi kuregis rekte al mi kaj invitis min por la virinelekta valso. Kaj poste ŝi valsadis tiel, ke neniam mi partoprenis ion similan. Ŝi estas freneza!

Kristin Tio ŝi ĉiam estis, sed neniam same kiel dum la lastaj dek kvar tagoj, post kiam la gefianĉiĝo rompiĝis.

Jean Ja, kio estas tiu historio? Li ja estis bonkondata viro, kvankam li ne estis riĉa. Ha! ili okupas sin per tiom da strangajoj.

Sidiĝas apud la fino de la tablo.

Estas tamen strange, pri la fraŭlino, hm, preferi res-

ti hejme kun la popolo, ĉu ne?, ol akompani sian patron por viziti parencojn?

Kristin Ŝi estas sendube iom ĝenata post tiu tumulto kun la fianĉo.

Jean Kredeble! Sed li estis viro, fakte kuraĝa viro. Ĉu vi scias, Kristin, kiel tio okazis. Mi vidis tion mem, kvankam mi pretendis, ke mi ne faras.

Kristin Ne! Ĉu vi vidis tion?

Jean Jes, tion mi faris. — Ili estis en la ĉevaleja korto iun vesperon kaj la fraŭlino sportekzercis lin, kiel ŝi nomis tion — ĉu vi scias, kio tio estis? Jes, ŝi igis lin transkuri la rajdvipon simile al hundo, kiun oni instruas salti. Li kuris du fojojn kaj ricevis unu vipobaton ĉiufoje; sed la trian fojon li prenis el ŝia mano la rajdvipon kaj rompitis ĝin en mil pecojn; post tio li foriris.

Kristin Ĉu tiel tio okazis! Ho ne! Kion vi diras!

Jean Jes, tiel okazis tiu afero! — Sed kion bonan vi povas doni al mi, Kristin?

Kristin *elprenas el la poto kaj antaŭmetas al Jean*
Nu, estas nur iom da reno, kiun mi eltrancis el la bovidaĵo!

Jean *flaras la manĝaĵon*
Bele! Ĝi estas mia granda delikataĵo!
Palpas la teleron
Sed vi povus esti varmiginta la teleron!

Kristin Vi ne estas pli facile kontentigebla ol la grafo mem, kiam li estas en sia kaprica humoro.

Tiras karese liajn harojn.

Jean *kolera*

Ne, vi ne taŭzu al mi la harojn! Vi scias, kiel sentema mi estas.

Kristin Nu nu, estis nur amo, tion vi ja scias!

Jean manĝas. Kristin malfermas botelon da biero.

Jean Biero, en la somermeza antaŭvespero; ne, mi dankas rifuze! Feliĉe mi havas ion pli bonan mem.

Malfermas tirkeston de tablo kaj elprenas botelon da ruĝa vino kun flava sigelvakso.

La Flava Sigelvakso, vi vidas! — Donu al mi nun glason! Piedan glason, kompreneble, kiam oni trinkas klase!

Kristin *reiras al la kameno kaj surmetas malgrandan kaserolon.*

Dio gardu tiun, kiu havos vin kiel edzo! Tia dorlotulo!

Jean Ho, babilaĵo! Vi estus sendube ĝoja, se vi povus havi tian bonmanieran viron, kiel min; kaj mi ne kredas, ke malutilis al vi, ke oni nomas min via fianĉo!

Gustumas la vinon.

Bona! Tre bona! Nur iom tro malmulte ĉambrumita!

Varmigas la glason per la mano.

Tion ĉi ni aĉetis en Dijon. Ĝi kostis kvar frankojn po unu litro sen vitro; kaj krom tio aldoniĝas la dogano! — Kion vi kuiras nun, kio odoras tiel infere?

- Kristin** Ho, tio estas ia diablaĵo, kiun la fraŭlino uzos por Diana.
- Jean** Vi devas esprimi vin bonzorge, Kristin! Sed kial vi kuiru por la hundino en la antaŭvespero de festo? Ĉu ĝi estas malsana?
- Kristin** Jes, ŝi estas malsana! Ŝi ŝteliĝis eksteren kun la mopso de la barilporda dometo — nun malfeliĉo okazis — kaj tion la fraŭlino ne volas toleri.
- Jean** La fraŭlino certe estas aroganta en kelkaj rilatoj kaj tro malmulte fiera en aliaj, same kiel la grafino dum ŝi vivis. Ŝi fartis plej bone en la kuirejo kaj la brutejo, sed ŝi neniam volis veturi per nur unu ĉevalo; ŝi portis malpurajn manumojn, sed sur la butonoj devis esti la grafa krono. — La fraŭlino, se ni parolu nun pri ŝi, ne prizorgas sin kaj sian personon. Mi volus diri, ke ŝi ne estas distingita. Ĵus, kiam ŝi dancis en la draŝejo, ŝi fortiris de la flanko de Anna la arbargardiston kaj mem lin invitis danci. Ni ne agus en tia maniero; sed tiel estas; kiam gesinjoroj volas montri sin malaltaj — tiam ili fariĝas malaltaj! Sed belega ŝi estas! Luksa! Ha! Kiaj ŝultroj! kaj — kaj tiel plu!
- Kristin** Ho ja, ne tiom fanfaronu! Mi tamen aŭdis, kion diras Klara, kiu ŝin vestis.
- Jean** Eĥ, Klara! Vi estas ĉiam ĵaluzaj unu al la alia! Mi, kiu rajdis kun ŝi ... Kaj ankaŭ kiel ŝi dancas!
- Kristin** Aŭdu, Jean! Ĉu vi ne volos danci kun mi, kiam mi estos preta?
- Jean** Jes, kompreneble mi volos.

- Kristin** Ĉu vi promesas tion?
- Jean** Promesas? Kiam mi diras, ke mi faros, tiam mi faros!
Nun vi havu dankon por la manĝo. Estis tre agrable!
Enmetas la korkon en la botelon.
- La fraŭlino** *en la pordo, parolas eksteren*
Mi baldaŭ revenos! Vi jam iru!
- La fraŭlino** *envenas; aliras al Kristin apud la spegulo*
Nu! ĉu vi estas preta?
- Kristin** *Signalas, ke Jean ĉeestas*
- Jean** *kavalire*
Ĉu sekretojn vi havas, sinjorinoj?
- La fraŭlino** *batas lin en la vizaĝo per sia poŝtuko.*
Kia scivolulo!
- Jean** Ha, kiel bonodoris tiu violaĵo!
- La fraŭlino** *kokete*
Senhonte! Ĉu vi komprenas la parfumojn ankaŭ?
Danci, tion vi scias bone ... nun ne rigardu! foriru.
- Jean** *arogante, ĝentile*
Ĉu ian sorĉosupon vi kuiras, sinjorinoj, en la somermeza nokto? Ion por antaŭdiri! la stelon de feliĉo, en kiu oni povas vidi sian estontan fianĉon!
- La fraŭlino** *akre*
Se li povos vidi tion, li devos havi bonajn okulojn!
Al Kristin
Verŝu en trionlitran botelon kaj korku bone! — Nun venu danci ŝotiŝon kun mi, Jean ...

- Jean** *prokrastante*
Mi ne volas esti malĝentila al iu, sed tiun ĉi dancon mi promesis al Kristin ...
- La fraŭlino** Nu, ŝi povos ja havi alian; ĉu ne, Kristin? Ĉu vi ne volas prunti Jean-on al mi?
- Kristin** Tio ne dependas de mi. Se vi, fraŭlino, estas tiel mal-fiere afabla, tiam ne decas, ke li rifuzu. Vi iru! kaj dan-ku ankoraŭ por la honoro.
- Jean** Por sincere diri, sen voli ofendi, mi dubas tamen, ĉu estas saĝe, ke vi, fraŭlino Julie dancas du fojojn sin-sekve kun la sama kavaliro, precipe ĉar la popolo ne malrapidas fari komentariojn ...
- La fraŭlino** *ekkoleras*
Kion? Kiajn komentariojn? Kion vi volas diri?
- Jean** *cedeme*
Ĉar vi, fraŭlino, ne volas kompreni, mi devas do pa-rolu pli klare. Aspektas malbone preferi unu el siaj subuloj antaŭ aliaj, kiuj atendas saman neordinaran honoron ...
- La fraŭlino** Preferi! Kiaj pensoj! Mi estas mirigita! Mi, la domes-trino, honoras per mia ĉeesto la dancadon de la po-polo, kaj kiam nun fakte mi volas danci, tiam mi vo-las danci kun homo scianta konduki, tiel ke mi evitu fariĝi ridinda.
- Jean** Kiel vi, fraŭlino, ordonas! Mi estas preta vin servi!
- La fraŭlino** *afable*
Ne komprenu tion kiel ordono! Hodiaŭ vespere ni

festas kiel gajaj homoj kaj formetas ĉian rangon! Jen,
donu al mi la brakon! Ne estu maltrankvila, Kristin!
Mi ne forprenos vian fianĉon!

Jean *donas sian brakon kaj elkondukas la fraŭlinon.*

Pantomimo

Estas ludata tiel kiel se la aktorino efektive estus sola en la ĉambro; turnas, se bezone, la dorson al la publiko; ne elrigardas en la salonon; ne rapidas, kvazaŭ ŝi timus, ke la publiko estos malpacienca.

Kristin *Sola. Mallaŭta muziko de violono de malproksime laŭ takto de ŝotiŝo.*

Kristin *kantetanta laŭ la muziko; malplenigas la tablon post la manĝo de Jean, lavas la teleron ĉe la akvostablo, viŝas kaj enmetas en ŝrankon.*

Post tio ŝi demetas de si la kuirejan antaŭtukon, elprenas el tirkeston de tablo malgrandan spegulon, metas ĝin kontraŭ la kruĉon kun siringoj sur la tablo; ekbruligas seban kandelon kaj varmigas harpinglon, per kiu ŝi krispigas la harojn de la frunto.

Poste eksteren en la pordo aŭskultante. Revenas al la tablo. Trovas la forgesitan naztukon de la fraŭlino, flaras ĝin; poste ŝi etendas ĝin, kvazaŭ enpensiĝe, streĉas ĝin, glatigas per la mano kaj faldas ĝin je kvar partoj k. t. p.

* * *

- Jean** *eniras sola*
Ja, sed ŝi *estas* freneza! Tia maniero danci! Kaj la popolo staras mokridante al ŝi malantaŭ la pordoj. Kion vi diras pri tio, Kristin?
- Kristin** Ha, estas ja ŝia periodo nun, kaj tiam ŝi estas ĉiam tiel stranga. Sed ĉu vi volas veni danci kun mi nun?
- Jean** Vi ne estas kolera al mi, ĉar mi lasis vin sidi ...
- Kristin** Neniel! — Ne pro tia bagatelo, tion vi certe scias; kaj mi ankaŭ konas mian lokon ...
- Jean** *metas la manon ĉirkaŭ ŝia talio*
Vi estas saĝa knabino, Kristin, kaj vi estos bona edzino ...
- La fraŭlino** *eniras; malagrabla surprizita; per pena ŝercemo*
Vi estas ĝuste ĉarma kavaliro — kiu forkuras de via sinjorino.
- Jean** Male, fraŭlino Julie, kiel vi vidas, mi rapidis trovi mian lasitan!
- La fraŭlino** *preterturnas la aferon*
Sciu, vi dancas kiel neniu alia! — Sed kial vi estas en livreo dum antaŭvespero de festo! Demetu tion tuj!
- Jean** Tiam mi devas peti, fraŭlino, ke vi foriru dum momento, ĉar mia nigra surtuto pendas ĉi tie ...
iras dekstren kun gesto
- La fraŭlino** Ĉu mi ĝenas vin? Por ŝanĝi surtuton! Eniru en vian ĉambron do kaj revenu! Aŭ vi povas resti, kaj mi turnos la dorson.
- Jean** Kun via permeso, fraŭlino!

*iras dekstren; oni vidas lian brakon, kiam li ŝanĝas
surtuton*

La fraŭlino *al Kristin*

Aŭdu Kristin; ĉu Jean estas via fianĉo, ĉar li estas tiel
intima?

Kristin Fianĉo? Jes, se oni tiel volas! Ni nomas ĝin tiel.

La fraŭlino Nomas?

Kristin Nu, la fraŭlino mem havis ja fianĉon kaj ...

La fraŭlino Jes ni estis fianĉigitaj vere.

Kristin Sed tio fariĝis ja nenio malgraŭ tio.

Jean *eniras; en nigra longsurtuto kaj nigra melonĉapelo*

La fraŭlino Très gentil; monsieur Jean! Très gentil!

Jean Vous voulez plaisanter, madame!

La fraŭlino Et vous voulez parler français! Kie vi lernis ĝin?

Jean En Svisujo dum mi estis "sommelier" en unu el la plej
grandaj hoteloj de Lucerno!

La fraŭlino Sed vi aspektas ja kiel "gentleman" en tiu redingoto!
Ĉarme!

sidiĝas apud la tablo

Jean Ho, vi flatas!

La fraŭlino *ofendite*

Flatas vin?

Jean Mia natura modesteco malpermesas al mi kredi, ke vi
diras veraĵn ĝentilaĵojn al tia homo kiel mi, kaj tial mi
permesis al mi supozi, ke vi troigis, aŭ kiel ĝi ankaŭ
estas nomata flati!

La fraŭlino Kie vi lernis esprimi la parolojn tiamaniere? Vi sendube vizitis la teatrojn multe?

Jean Ankaŭ tion! Mi vizitis multajn lokojn, mi!

La fraŭlino Sed vi ja naskiĝis en ĉi tiu regiono, ĉu?

Jean Mia patro estis taglaboristo ĉe la advokاتفiskalo ĉi proksime, kaj mi jam vidis la fraŭlinon kiel infanon, kvankam la fraŭlino min ne rimarkis!

La fraŭlino Ne, efektive!

Jean Jes, kaj mi rememoras speciale unu fojon. Ja, tion mi ne povas rakonti!

La fraŭlino Tamen jes! Faru! Ĉu? Faru escepton al regulo!

Jean Ne, mi fakte ne povas nun! Alian fojon, eble.

La fraŭlino "Alia fojo estas fripono". Ĉu estas tiel danĝere nun?

Jean Danĝere ne estas, sed min ĝenas! — Rigardu tiun tie!
Montras al Kristin, kiu endormiĝis en seĝo apud la kamento.

La fraŭlino Estos agrabla edzino, tiu! Povas esti ke ŝi ankaŭ ronkas?

Jean Tion ŝi ne faras, sed ŝi parolas en dormo.

La fraŭlino *cinike*

Kiel vi scias, ke ŝi parolas en dormo?

Jean *senhonte*

Mi aŭdis!

Paŭzo, dum kiu ili rigardas unu la alian.

La fraŭlino Kial vi ne sidiĝas?

Jean Tion mi ne povas permesi al mi en via ĉeesto!

- La fraŭlino** Sed se mi ordonas tion?
- Jean** Tiam mi obeas!
- La fraŭlino** Do, sidiĝu! — Sed atendu! Ĉu vi povas doni al mi ion por trinki unue?
- Jean** Mi ne scias, kion ni povas havi en tiu glacikesto. Mi pensas, ke estas nur biero.
- La fraŭlino** Tio ne estas "nur"! kaj mi havas tiel simplan gustosenton, ke mi preferas ĝin al vino.
- Jean** *elprenas el la glacikesto botelon da biero, kiun li malfermas; serĉas en la ŝranko glason kaj teleron, servas.*
Bonvolu!
- La fraŭlino** Dankon! Ĉu vi ne volas trinki mem?
- Jean** Mi ne tre ŝatas bieron, sed se la fraŭlino ordonas!
- La fraŭlino** Ordonas? — Ŝajnas al mi, ke vi povas, kiel ĝentila kavaliro, fari societon al via sinjorino.
- Jean** Tio estas tre ĝusta rimarko!
Malfermas ankoraŭ unu botelon, prenas glason.
- La fraŭlino** Trinku nun je mia sano!
- Jean** *ŝanceliĝas*
- La fraŭlino** Mi kredas, ke la plenkreskulo estas timema!
- Jean** *surgenue, ŝercante parodie; levante sian glason*
Je la sano de mia ordonantino!
- La fraŭlino** Brave! Nun vi kisu mian ŝuon ankaŭ, kaj la pentraĵo estos plensukcesa.
- Jean** *ŝanceliĝe, sed poste kuraĝe kaptante ŝian piedon, kiun li kisas malpeze.*

La fraŭlino Perfekte! Vi estus fariĝinta aktoro.

Jean *stariĝas*

Tio ĉi ne plu konvenas, fraŭlino; iu povus veni kaj vidi nin.

La fraŭlino Ĉu tio gravus?

Jean Ĉar la bienhomoj kalumnie babilas, tute simple! Kaj se la fraŭlino scius, kiel rapide ĵus iliaj langoj moviĝis tie supre, tiam ...

La fraŭlino Kion ili diris do? Rakontu al mi! — Sidiĝu nun!

Jean *sidiĝas*

Mi ne volas ofendi vin, sed ili uzis esprimojn, kiuj ĵetis suspektojn tiaspecajn, ke ... ja tion vi povas kompreni mem! Vi ne estas infano, kaj kiam oni vidas sinjorinon trinkantan sola kun viro — eĉ se estas domservisto — nokte — oni ...

La fraŭlino Oni kion! Kaj cetere ni ne estas solaj. Kristin ja ĉeestas.

Jean Dormanta, jes!

La fraŭlino Do mi vekos ŝin!

stariĝas

Kristin! Ĉu vi dormas!

Kristin *en la dormo*

Bla — bla — bla — bla!

La fraŭlino Kristin! — Ŝi povas dormi!

Kristin *en la dormo*

La botoj de la grafo estas purigitaj — ekkui la kafon — tuj, tuj, tuj, — ho ho — puh!

La fraŭlino *prenas ŝian nazon*

Ĉu vi volas vekiĝi!

Jean *severe*

Oni ne ĝenu dormanton!

La fraŭlino *akre*

Kion!

Jean Kiu staris apud la kuirforno la tutan tagon, tiu povas esti laca, kiam venas la nokto. Kaj la dormon oni respektu ...

La fraŭlino *transturnas la aferon*

Tio estas bela penso, kaj ĝi honoras vin — dankon pro tio!

donas al Jean la manon

Venu nun eksteren kaj kolektu por mi iom da sirinĝoj!

Dum la sekvanta tempo Kristin vekiĝas, pasas dormema dekstren por kuŝiĝi.

Jean Kun la fraŭlino?

La fraŭlino Kun mi!

Jean Tio ne konvenas! Absolute ne!

La fraŭlino Mi ne povas kompreni viajn pensojn. Ĉu estus eble, ke vi imagas al vi ion?

Jean Ne! mi ne, sed la homoj.

La fraŭlino Kion? Ke mi estus enamiĝinta al la servisto?

Jean Mi ne estas tromemfida viro, sed oni vidis ekzemplojn — kaj al la bienpopolo nenio restas sankta!

- La fraŭlino** Vi estas aristokrato, mi kredas!
- Jean** Jes, tia mi estas.
- La fraŭlino** Mi malsupreniros ...
- Jean** Ne malsupreniru, aŭskultu mian konsilon! Neniu kredos, ke vi memvole malsupreniras; la popolo ĉiam diros, ke vi malsuprenfalas!
- La fraŭlino** Mi havas pli altajn pensojn pri la popolo ol vi! Venu kaj provu! — Venu!
- Ŝi englutas lin per siaj okuloj*
- Jean** Sciu, ke vi estas stranga!
- La fraŭlino** Povas esti! Sed tia vi ankaŭ estas! Ĉio estas stranga cetere! La vivo, la homoj, ĉio estas naĝanta miksaĵo, kiu peliĝas, peliĝadas antaŭen sur la akvo, ĝis ĝi subakviĝas, subakviĝadas! Mi havas songon, kiu revenas de tempo al tempo; kaj kiun mi rememoras nun. Mi sidas rampinta supren sur kolono kaj ne vidas eblon veni malsupren; mi eksentas kapturniĝon, kiam mi rigardas malsupren, kaj malsupren mi devas veni, sed mi ne havas kuraĝon ĵeti min suben; mi ne povas reteni min kaj mi deziregas fali; sed mi ne ekfalias. Kaj tamen mi ne havos trankvilon antaŭ ol mi iros malsupren, ne havos ripozon antaŭ ol mi iros malsupren, malsupren sur la terfundon! Kaj se mi estos atinginta la terfundon, mi volus eniĝi en la teron ... Ĉu vi sentis ion tiaspecan?
- Jean** Ne! Mi kutimas songi, ke mi kuŝas sub alta arbo en malluma arbaro. Mi volas leviĝi, leviĝi sur la supron por ĉirkaŭrigardi la luman pejzaĝon, kie la suno bri-

las, rabi la birdneston tie supre, kie troviĝas la oraj ovoĵ. Kaj mi surrampas, surrampadas, sed la trunko estas tiel dika, tiel glata, kaj tiel malproksima estas la unua branĉo. Sed mi scias, ke se mi atingus nur la unuan branĉon, mi marŝus al la supro, kvazaŭ sur ŝtupetaro. Ankoraŭ mi ne atingis ĝin, sed mi ĝin atingos, eĉ se nur en sonĝo!

La fraŭlino Jen mi staras babilante pri sonĝoj kun vi. Venu nun! Nur en la parkon!

Ŝi prezentas al li sian brakon, kaj ili iras.

Jean Ni dormos sur naŭ somermezaj floroj hodiaŭ nokte, kaj ni sonĝos la estonton, fraŭlino!

La fraŭlino kaj Jean turnas sin en la pordo. Jean tenas la manon antaŭ unu okulo.

La fraŭlino Lasu min vidi, kion vi ekhavis en la okulo!

Jean Ho, estas nenio — nur polvo — tio tuj pasos.

La fraŭlino La maniko de mia vesto vin ekfrotetis; sidiĝu nun, kaj mi helpos vin!

Prenas lian brakon kaj sidigas lin, ekkaptas lian kapon kaj klinas ĝin malantaŭen; per la ekstremaĵo de la poŝtuko ŝi provas forigi la polveron.

Sidu senmove nun; tute senmove!

Ekfrapas lian manon.

Jen! volu obei! — Mi kredas, ke li tremas, la granda forta viro!

Prempalpas lian brakon.

Kun tiaj brakoj!

- Jean** *avertante*
Fraŭlino Julie!
- La fraŭlino** Jes, monsieur Jean.
- Jean** Attention! Je ne suis qu'un homme!
- La fraŭlino** Bonvolu sidi trankvile! — Jen! Nun ĝi estas for! Kisu mian manon, kaj danku min!
- Jean** *stariĝas*
Fraŭlino Julie! Aŭskultu min! Kristin jam foriris por kuŝiĝi. — Bonvolu aŭskulti min!
- La fraŭlino** Kisu unue mian manon!
- Jean** Aŭskultu min!
- La fraŭlino** Kisu unue mian manon!
- Jean** Jes, sed kulpigu vin mem!
- La fraŭlino** Pro kio?
- Jean** Pro kio? Ĉu vi estas infano ĉe dudekkvin jaroj? Ĉu vi ne scias, ke estas danĝere ludi kun la fajro?
- La fraŭlino** Por mi ne; mi estas asekurita!
- Jean** *kuraĝe*
Vi ne estas! Kaj se vi estas, tamen estas brulemaĵo en la proksimeco!
- La fraŭlino** Ĉu tio estas vi?
- Jean** Jes! Ne pro tio, ke estas mi, sed pro tio, ke mi estas juna viro.
- La fraŭlino** Kun beleta vizaĝo — kia nekredebla tromemfideco! Iu Don Juan eble! Aŭ iu Jozefo! Mi kredas, je mia fido, ke li estas iu Jozefo!

- Jean** Ĉu vi kredas?
- La fraŭlino** Mi preskaŭ timas!
- Jean** *kuraĝe aliras kaj volas kapti ŝin ĉirkaŭ la talio por kisi ŝin.*
- La fraŭlino** *batas liajn vangojn*
Hontu!
- Jean** Ĉu estas serioze aŭ ŝerce?
- La fraŭlino** Serioze!
- Jean** Sekve ankaŭ ĵus estis serioze! Vi petolas entute tro serioze kaj tio estas la danĝero! Nun mi estas tedita je la ludo kaj petas senkulpigon, ĉar mi reiros al mia laboro. La grafo volas rehavi siajn botojn ĝustatempe, kaj noktomezo jam de longe pasis.
- La fraŭlino** Formetu la botojn!
- Jean** Ne! Tio estas mia servado, kiun devas fari, sed mi neniam prenis sur min la taskon esti via kunludulo, kaj neniam mi povos esti, ĉar mi opinias min tro bona por tio.
- La fraŭlino** Vi estas fiera!
- Jean** En kelkaj okazoj jes; en aliaj ne.
- La fraŭlino** Ĉu vi iam amis?
- Jean** Ni ne uzas tiun vorton, sed mi amis multe da knabinoj, kaj unu fojon mi estis malsana pro tio, ke mi ne povis ricevi tiun, kiun mi volis havi: malsana, aŭdu, kiel la princoj en Mil kaj unu noktoj! kiuj ne povis manĝi nek trinki pro nura amo!
- La fraŭlino** Kiu estis ŝi?

Jean *silentas*

La fraŭlino Kiu estis ŝi?

Jean Tion vi ne povas devigi min diri.

La fraŭlino Se mi petas vin kiel egalulo, petas — amikon! Kiu estis ŝi?

Jean Ŝi estis vi!

La fraŭlino *eksidiĝas*

Kiel strange!

Jean Jes, se vi volas tiel diri! Estis ridinde! — Jen aŭdu, tio estis la historio, kiun mi ĵus ne volis rakonti, sed nun mi rakontos ĝin!

Ĉu vi scias, kiel la mondo aspektas de tie malsupre — tion vi ne scias! Simile al akcipitroj kaj falkoj, kies dorsojn oni malofte povas vidi, ĉar ili flugas tie supre! Mi vivis en la dometo de taglaboristo, kun sep gefratoj kaj unu porkido, ekstere sur la griza plugkampo, kie kreskis neniu arbo! Sed de la fenestroj mi vidis la ŝtonmuron de la parko de la grafo, kun la pomarboj surpende. Tio estis la ĝardeno de la paradizo; kaj tie staris multe da malbonaj anĝeloj kun brulflamantaj glavoj, kiuj gardis ĝin. Sed malgraŭ ĉio mi kaj aliaj buboj trovis la vojon al la arbo de la vivo — nun vi min malestimas —

La fraŭlino Ha! Pomojn ŝtelas ja ĉiuj buboj.

Jean Tiel vi povas diri nun, sed vi malestimas min en ĉiu kazo. Tute egale! Unu fojon mi envenis en la paradizon kun mia patrino por sarki la cepobedojn. Apud la plantejoj de la ĝardeno staris turka pavilono en la

ombro de jasmenoj kaj kovrita per kreskanta lonice-ro. Mi ne sciis, por kio ĝi povas esti uzata, sed mi neniam estis vidinta tiel belan konstruaĵon. Homoj eniris tien kaj poste eliris, kaj iun tagon la pordo restis nefermita. Mi enŝteliĝis kaj vidis, ke la muroj estas ornamitaj per pentraĵoj de reĝoj kaj imperiestroj, kaj antaŭ la fenestroj estis ruĝaj kurtenoj kun franĝoj — vi ja komprenas kion mi aludas. Mi —

deŝiras floron de siringo kaj tenas sub la nazo de la fraŭlino

Mi neniam estis enirinta la kastelon, neniam vidis pli multe ol la preĝejon — sed ĉi tio estis pli bela; kaj kiel ajn miaj pensoj kuradis, ili konstante reiris tien. Kaj iom post iom naskiĝis en mi la sopiro provi unu fojon la plezuron de — fine, mi enŝteliĝis, vidis kaj admiris. Sed tiam iu venis! Ekzistis nur unu elirejo por sinjoraj homoj, sed por mi ekzistis ankoraŭ unu, kaj mi ne havis alian elekton ol ĝin!

La fraŭlino *kiu prenis la siringon, lasas ĝin fali sur la tablon*

Jean Post tio mi komencis kuri, ĵetis min tra vico de frambarbustoj, rapidegis trans plantejon de fragoj kaj alvenis sur la terason de rozoj. Tie mi ekvidis rozkoloran veston kaj paron da blankaj ŝtrumpoj — tio estis vi. Mi kuŝigis min sub amason da sarkaĵo, sub — imagu al vi — sub kardoj pikantaj kaj malseka teraĵo malbonodoranta. Kaj mi rigardis vin promenanta inter la rozoj, kaj mi pensis: se estas vere, ke rabisto povas enveni en la ĉielon kaj resti kun la anĝeloj, tiam estas strange, ke infano de taglaboristo tie ĉi sur la tero de

Dio ne povas enveni en la kastelan parkon kaj ludi kun la filino de grafo!

La fraŭlino *elegie*

Ĉu vi kredas, ke ĉiuj malriĉaj infanoj havus tiajn samajn pensojn, kiel vi en tiu okazo?

Jean *unue ŝanceliĝe, poste konvinkige*

Ĉu ĉiuj malriĉaj — jes — kompreneble! Kompreneble!

La fraŭlino Estas, sendube, senlima malfeliĉo esti malriĉa!

Jean *kun profunda doloro, troemfaze*

Ho, fraŭlino Julie! Ho! — Hundo povas havi la permeson kuŝi en la sofo de la grafino, ĉevalo povas esti karesata sur la buŝego per fraŭlina mano, sed servutulo —

turniĝas

— ja ja, estas ŝtofo en unu aŭ alia, tiel ke li altiĝas en la mondo, sed kiom ofte tio okazas! — nu, ĉu vi scias kion mi poste faris! — Mi enkuris en la muelejan rivereton tute vestita; estis eltirita kaj ricevis batojn. Sed la sekvintan dimanĉon, kiam la patro kaj ĉiuj de la domo forveturis por viziti mian avinon, tiam mi tiel aranĝis, ke mi restis hejme. Kaj tiam mi lavis min per nigra sapo kaj varma akvo, surmetis mian plej bonan veston kaj iris en preĝejon, kie mi estis vidonta vin! Mi vidis vin kaj reiris hejmen, decidinte morti; sed mi volis morti bele kaj agrable, sen doloro. Kaj tiam mi memoris, ke estas danĝere dormi sub sambuko. Ni havis grandan sambukon ĵus florantan. Ĝin mi prirabis je ĉio, kion ĝi posedis, kaj tiarimede mi sternis

kuŝujon al mi en avenkestego. Ĉu vi rimarkis, kiel glata estas aveno? mola por la mano kiel homa haŭto — nu, mi surfaligis la kestan kovrilon kaj fermis la okulojn; endormiĝis kaj estis vekita fakte tre malsana. Sed mi ne mortis, laŭ kio vi povas vidi.

Kion mi volis — mi ne scias! Vin gajni estis ja neniam espero — sed vi estis simbolo kiel senespere estas leviĝi el la rondo, en kiu mi naskiĝis.

La fraŭlino Vi rakontas ĉarme, sciu! Ĉu vi vizitadis lernejon?

Jean Iom; sed mi legis multajn romanojn kaj iris al teatro. Krom tio mi aŭdis bonedukitajn homojn paroli, kaj de ili mi lernis plej multe.

La fraŭlino Ĉu vi staras kaj aŭskultas, kion ni diras!

Jean Jes certe! Kaj multon mi aŭdis! kiam mi okupis la veturigistan sidilon aŭ remis la ŝipeton. Iun fojon mi aŭdis fraŭlinon Julie kun amikino...

La fraŭlino Ho! — Kion vi aŭdis tiam?

Jean Jes ja, ne estas facile rediri; sed certe mi miris iom, kaj ne komprenis, kie vi lernis ĉiujn vortojn. Povas esti, ke en la fundo ne ekzistas tiel granda diferenco inter homoj kaj homoj!

La fraŭlino Ho fi! Ni ne vivas same kiel vi, kiam ni estas gefianĉoj.

Jean *fikse rigardas ŝin*

Ĉu tio estas tute certa? Jes, antaŭ mi fraŭlino ne ŝaj-nigu sin senkulpa ...

La fraŭlino Estis malnoblulo, al kiu mi donis mian amon.

- Jean** Tiel vi ĉiam diras — poste.
- La fraŭlino** Ĉiam?
- Jean** Mi kredas, ke ĉiam, ĉar mi aŭdis la esprimon multfoje antaŭe ĉe samspecaj okazoj.
- La fraŭlino** Kia okazo?
- Jean** Sama kiel la nun preparolata! La lastan fojon ...
- La fraŭlino** *stariĝas*
Silentu! Mi ne volas aŭdi pli!
- Jean** Ankaŭ ŝi ne volis — tio estas stranga. Nu, mi petas do vian permeson foriri por dormi.
- La fraŭlino** *afable*
Foriri por domi en la somermeza nokto!
- Jean** Jes! Danci kun la popolaĉo tie sur la monteto ne nepre plaĉas al mi.
- La fraŭlino** Kunprenu la ŝlosilon de la boato kaj remveturigu min sur la lago, mi volas vidi la sunleviĝon?
- Jean** Ĉu tio estas saĝa?
- La fraŭlino** Ŝajnas laŭ viaj paroloj, ke vi timas pri via famo!
- Jean** Kial ne? Mi ne deziras esti ridinda, ne deziras esti forpelota kaj resti sen serva atestaĵo, kiam mi fondos mian propran entreprenon. Kaj mi opinias ankaŭ, ke min ligas ia devo rilate al Kristin.
- La fraŭlino** O ho, nun ankaŭ Kristin ...
- Jean** Jes, sed ankaŭ vi. — Obeu mian konsilon, iru en vian ĉambbron por dormi!
- La fraŭlino** Ĉu mi obeu al vi?

Jean Unu fojon nur; por via propra bono! Mi vin petas! La nokto estas baldaŭ finota, la dormo ebriigas, kaj la kapo fariĝas varmega! Iru dormi! Cetere — se mi ne aŭdas erare — la homoj venas ĉi tien por serĉi min! Kaj se oni trovas vin ĉi tie, vi estas perdita!

La ĥoro alproksimiĝas kantante:

Du venis virinoj el arboj
Tridiridi-ralla tridiridi-ra.
Piedoj de unu malsekaj
Tridiridi-ralla-la.

Pri cent ili diris taleroj
Tridiridi-ralla tridiridi-ra.
Sed havis apenaŭ oeron
Tridiridi-ralla-la.

Florkronon mi al vi donas
Tridiridi—ralla—tridira.
Alian mi penskonas
Tridiridi—ralla—la!

La fraŭlino Mi konas la bienhomojn, kaj mi ilin amas, kiel ili amas min. Lasu ilin veni kaj vi vidos!

Jean Ne, fraŭlino Julie, ili ne amas vin. Ili akceptas vian nutraĵon, sed ili kraĉas post ĝin! KREDU min! Aŭskultu ilin, nur aŭskultu ilin, kion ili kantas! — Ne, ne aŭskultu!

- La fraŭlino** *Ekaŭskultas*
Kion ili kantas?
- Jean** Estas kalumnia kantaĵo! Pri vi kaj mi!
- La fraŭlino** Hontinde! Ho, fi! Kaj kiel perfide! —
- Jean** La kanajlaro estas ĉiam malkuraĝa! Kaj en ĉi tiu batalo oni povas nur forkuri!
- La fraŭlino** Forkuri? Sed kien? Eksteren ne estas eble trairi! Kaj al Kristin ni ne povas iri!
- Jean** Tiel! Ĉu en mian ĉambron? La neceso ne havas leĝon; kaj al mi vi povos fidi, ĉar mi estas via vera, sincera kaj respektoplena amiko!
- La fraŭlino** Sed supozu! — supozu ke oni serĉos nin tie?
- Jean** Mi riglos la pordon, kaj se oni volos enrompi ĝin, mi pafos! — Venu!
surgenue
Venu!
- La fraŭlino** *grave*
Ĉu vi promesas al mi ...?
- Jean** Mi ĵuras!
- La fraŭlino** *eliras rapide dekstren*
- Jean** *rapide postsekvas*

Baledo

Vilaĝanoj eniras feste vestitaj, kun floroj sur la ĉapeloj; violonludanto en la unua vico; kvaronbarelon da biero kaj bareleton da brando, ornamitajn per verdaĵo, oni metas sur la tablon; glasojn oni alportas. Post tio oni trinkas. Poste oni faras rondon, kantas kaj dancas la dancludon:

”Du venis virinoj el arboj”.

Farinte ĉi tion, ili reforiras kantante.

* * *

La fraŭlino *eniras sola; ekvidas la malordon en la kuirejo; kunfrapas la manojn; poste ŝi elprenas plumbufon kaj pudrumas sian vizaĝon*

Jean *eniras; ekscitita*

Jen vi vidas! Kaj vi aŭdis! Ĉu vi pensas, ke estas eble resti ĉi tie!

La fraŭlino Ne! Mi pensas ke ne! sed kion ni devas do fari?

Jean Forkuri, forvojaĝi, malproksimen de ĉi tie!

La fraŭlino Forvojaĝi? Jes, sed kien?

Jean Al Svisujo, al la italaj lagoj; tie vi ne estis?

La fraŭlino Ne! Ĉu tie estas bele?

Jean Ho, eterna somero, oranĝarboj, laŭroj, ho!

La fraŭlino Sed kion ni poste faru tie!

Jean Mi fondos hotelon kun unuaklasaj vendaĵoj kaj unuaklasaj klientoj.

La fraŭlino Hotelon?

Jean Jen estas vivo, kredu; senĉese novaj vizaĝoj, novaj lingvoj; ne unu minuto da libertempo por cerbumado aŭ nervoj; nenia serĉo de okupado — ĉar la laboro donas sin mem: nokte kaj tage la sonorileto ektintas, la vagonaro fajfas, la omnibuso iras kaj reiras; dum la pecoj da oro ruladas en la kontoro. Jes estas vivo!

La fraŭlino Jes, tio estas vivi! Kaj mi?

Jean La ordonantino de la domo; la ornamo de la firmao. Kun via aspekto ... kaj via kondutmaniero — ho estos certa sukceso! Kolosa! Vi sidas kvazaŭ reĝino en la kontoro movigante la sklavojn per ekpremo al elektra butono; la gastoj pretermarŝas en longa vico antaŭ via trono kaj metas modestaj sian trezoron sur vian tablon — vi ne povas kredi, kiel tremas la homoj, kiam ili ricevas en sian manon kalkulon — mi salos la notojn kaj vi sukeros ilin per via plej bela rideto — ha! ni forvojaĝu de ĉi tie —

elprenas el sia poŝo informlibreton de veturoj

— tuj, per la proksima vagonaro! — ni estos en Malmö je la sesa kaj tridek minutoj; en Hamburgo je la oka kaj kvardek minutoj morgaŭ matene; Frankfurto—Bazelo unu tagon, kaj en Komo per la fervojo de Sankta Gotardo post, mi vidu, tri tagoj! Tri tagoj!

La fraŭlino Ĉio tio estas tre bona! Sed Jean — donu al mi la kura-

ĝon — diru, ke vi amas min! Venu kaj ĉirkaŭbraku min!

Jean *ŝanceliĝante*

Mi volas — sed mi ne kuraĝas! Ne en ĉi tiu domo plu. Mi amas vin — sen dubo — ĉu vi povas dubi pri tio?

La fraŭlino *timente, vere virinece*

”Vi”! — Diru ”ci”! Inter ni ne ekzistas plu baroj! — Diru ”ci”!

Jean *turmentite*

Mi ne povas! Ekzistas baroj inter ni ankoraŭ, tiel longe kiel ni restas en ĉi tiu domo — ekzistas la estinteco, ekzistas la grafo — kaj mi neniam renkontis iun personon, al kiu mi havas tian respekton — sufiĉas, ke mi ekvidas liajn gantojn kuŝantaj sur seĝo, mi tuj sentas min malgranda — sufiĉas, ke mi ekaŭdas la sonorileton tie supre, mi kuntiriĝas pro timo, kiel time-ma ĉevalo — kaj kiam mi vidas nun liajn botojn starantaj tiel rektaj kaj fieraj, mi sentas ektiriĝon en mia dorso!

piedfrapas la botojn

Superstiĉo, antaŭjuĝoj, kiujn oni instruis al ni komence de nia infaneco — sed kiujn, oni povos tiel facile forgesi. Venu nur en alian landon, kie estas respubliko, kaj oni ekstaras sur la nazo antaŭ la livrejo de mia pordisto — sur la nazo oni devas stari, vi komprenu! sed mi ne staros! Mi ne estas naskita por stari sur la nazo, ĉar troviĝas en mi ŝtofo, troviĝas karaktero, kaj se mi nur ekkaptos la unuan branĉon, tiam vi vidos,

ke mi surrampos la arbon! Mi estas lakeo hodiaŭ, sed venontjare mi estos posedanto, post dek jaroj mi estos rentulo, kaj poste mi iros en Rumanujon, ordenigos min, kaj povos — rimarku bone ke mi diras povos — fini kiel grafo!

La fraŭlino Bele, bele!

Jean Ha, en Rumanujo oni aĉetas al si la titolon de grafo, kaj tiel vi estos grafino malgraŭ ĉio! Mia grafino!

La fraŭlino Mi ne zorgas pri tio, kion mi nun ĵetas post min! — Diru, ke vi min amas, se ne — ja, kio mi estas se ne?

Jean Mi diros ĝin mil fojojn — poste! Nur ne tie ĉi! Kaj antaŭ ĉio, neniaj sentoj, se ĉio ne estu perdita! Ni devas konsideri la aferon sobre! kiel saĝaj homoj,

elprenas cigaron, senpintigas kaj ekbruligas ĝin

Sidiĝu nun tie! kaj mi sidiĝu ĉi tie, kaj tiel ni interparolu, kvazaŭ nenio estus okazinta.

La fraŭlino *senespera*

Ho, Die mia! Ĉu vi ne havas sentojn!

Jean Mi! Ne ekzistas homo same sentema kiel mi; sed mi scias min regi.

La fraŭlino Ĵus vi povis kisi mian ŝuon — kaj nun!

Jean *severe*

Jes, tio estis tiam! Nun alion ni devas pripensi.

La fraŭlino Ne parolu al mi severe!

Jean Ne! sed saĝe! Unu malsaĝaĵo estas farita, ne faru pli da ili! La grafo povas reveni en kiu ajn momento kaj

antaŭ tio niaj sortoj devas esti difinitaj. Kiel ŝajnas al vi miaj planoj pri la estonteco? Ĉu vi provas ilin?

La fraŭlino Ili ŝajnas al mi tre akcepteblaj, sed nur unu demando: por tiel granda entrepreno estas necesa granda kapitalo; ĉu vi havas ĝin?

Jean *mordetas la cigaron*

Mi! Tute certe! Mi havas mian konon specialistan, mian eksterordinaran sperton, miajn lingvokonojn! Tio estas kapitalo taŭga, mi kredas!

La fraŭlino Sed per ĝi vi eĉ ne povas aĉeti fervojan bileton.

Jean Tio estas sendube vera; sed jen la kaŭzo, kial mi serĉas komanditanton, kiu povos pruntedoni la fondkapitalon!

La fraŭlino Kie vi trovos tian homon rapide?

Jean Tian vi trovos, se vi volas fariĝi mia kompaniano!

La fraŭlino Tion mi ne povas. Kaj mi mem nenion posedas.
Paŭzo

Jean Sekve la tuta afero nuliĝas—

La fraŭlino Kaj —

Jean Ĉio restas kiel estas!

La fraŭlino Ĉu vi kredas, ke mi restos sub ĉi tiu tegmento kiel via kunkuŝantino? Ĉu vi kredas, ke mi volas lasi la bienpersonaron fingromontri al mi; ĉu vi pensas, ke mi povas rigardi mian patron en la vizaĝon post tio ĉi? Ne! Forkonduku min de ĉi tie, de la malhonoriĝo kaj hontego! — Ho, kion mi faris, Dio mia, Dio mia!

Ploras

Jean Aj nu, ĉu nun komenciĝas tiu tono! — Kion vi faris? La samon, kion multaj antaŭ vi!

La fraŭlino *krias en konvulsia tordiĝo*
Kaj nun vi malestimas min! — Mi falas, mi falas!

Jean Falu malsupren al mi, kaj mi levos vin poste!

La fraŭlino Kiu terura potenco altiris min al vi? Tiu de la malfortulo al la fortulo? Tiu de la falanto al la leviĝanto! Aŭ ĉu tio estis amo! Amo tio! Ĉu vi scias, kio estas amo?

Jean Mi? Jes certe, pri tio vi estu tute certa; ĉu vi kredas, ke mi ne provis jam la batalon?

La fraŭlino Kian lingvaĵon vi parolas kaj kiajn pensojn vi pensas!

Jean Tion mi lernis, kaj tia mi estas! Ne estu nun nerva kaj ne ludu noblamaniere, ĉar ni estas nun ambaŭ egalvaloraj! — Nu nu, knabineto mia, venu kaj mi proponos al vi glason da ekstra bonaĵo!

Malfermas la tirkeston de la tablo kaj elprenas vinbotelon; plenigas du uzitajn glasojn.

La fraŭlino De kie vi ricevis tiun vinon?

Jean De la kelo!

La fraŭlino Burgunda de mia patro!

Jean Ĉu ĝi ne taŭgas por la bofilo?

La fraŭlino Kaj mi trinkas bieron! Mi!

Jean Tio montras nur, ke vi havas malpli bonan gustosenton ol mi.

La fraŭlino Ŝtelisto!

Jean Ĉu vi intencos ĉikani min?

La fraŭlino Ho ho! Kunkulpa kun endoma ŝtelisto! Ĉu mi estis ebria, ĉu mi agis songante en ĉi tiu nokto? La somermeza nokto! La festo de ludoj senkulpaj ...

Jean Senkulpaj, hm!

La fraŭlino *iradas tien reen*
Ĉu ekzistas sur la tero en ĉi tiu momento homo same malfeliĉa kiel mi!

Jean Kial vi estas malfeliĉa? Post tia konkero! Pensu pri Kristin tie interne! Ĉu vi ne kredas, ke ankaŭ ŝi havas sentojn?

La fraŭlino Mi tion kredis antaŭ momento, sed mi ne kredas plu! Ne; lakeo estas lakeo ...

Jean Kaj putino estas putino!

La fraŭlino *surgenue kunplektinte la manojn*
Ho, Dio en la ĉielo, ĉesigu mian mizeran vivon! Forprenu min el tiu ĉi putraĵo, en kiun mi dronas! Savu min! Savu min!

Jean Mi ne povas nei, ke mi kompatas vin! Kiam mi kuŝis en la cepobedo kaj vidis vin en rozĝardeno, tiam ... ĉu mi diru tion nun... mi havis la samajn malbelajn pensojn, kiel ĉiuj buboj.

La fraŭlino Sed vi, kiu volis morti pro mi!

Jean En la avenkestego? Tio estis nura babilaĵo.

La fraŭlino Ĉu mensogo sekve—!

Jean *kontencas esti dormema*
Preskaŭ! Tiun rakonton mi laŭ mia memoro legis en ia gazeto pri kamentubisto, kiu kuŝiĝis sin en brulo-

lignaĵujon kun siringfloroj, ĉar li estis leĝe persekutata pro ŝuldata infaneduka pago ...

La fraŭlino Ha, vi estas tia ...

Jean Ion mi devis trovi! Oni ĉiam kaptas la virinojn per luksbrilaĵoj!

La fraŭlino Malnoblulo!

Jean Fek!

La fraŭlino Kaj nun vi ekvidis la dorson de la akcipitro —

Jean Ne precize la dorson —

La fraŭlino Kaj mi devis esti la unua branĉo —

Jean Sed la branĉo estis putra —

La fraŭlino Mi estus la ŝildo de la hotelo —

Jean Kaj mi la hotelo —

La fraŭlino Sidadi ĉe via kastablo, allogi viajn klientojn, falsi viajn kalkulojn —

Jean Tion mi mem —

La fraŭlino Ke homa animo povas esti tiel profunde malpurega!

Jean Lavu ĝin do!

La fraŭlino Lakeo, servisto, stariĝu, kiam mi parolas!

Jean Kunkuŝantino de servisto, voluptubino de lakeo, silentu kaj eliru de ĉi tie. Ĉu vi venas por riproĉi min, ke mi estas kruda? Tiel krude, kiel vi kondukis hodiaŭ vespere, neniam kondukis iu el miaj egaluloj. Ĉu vi kredas, ke iu servistino atakas virojn kiel vi? Ĉu vi vidis iun knabinon el mia klaso sin proponi tiamaniere? Tion mi vidis nur inter bestoj kaj virinoj falintaj!

La fraŭlino *frakasita*

Estas ĝuste; batu min; piedpremu min; mi ne meritas ion pli bonan. Mi estas malbonega; sed helpu min! Helpu min eliri el ĉi tio, se ekzistas ia ajn eblo!

Jean *pli pace*

Mi ne volas surgluigi al mi la honton cedi mian porcion de la honoro esti deloginta; sed ĉu vi kredas, ke homo en mia situacio kuraĝus ĵeti siajn rigardojn al vi, se vi mem ne estus sendinta la inviton! Mi sidas ankoraŭ mirigita —

La fraŭlino Kaj fiera —

Jean Kial ne? Kvankam mi devas konfesi, ke la venko estis por mi tro facila por povi efektive doni ebriecon.

La fraŭlino Batu min plie!

Jean *stariĝas*

Ne! Pardonu al mi, anstataŭe, tion, kion mi diris! Mi ne batas senarmigiton, eĉ malpli virinon. Mi ne povas nei, ke unuflanke mi ĝojas esti vidinta, ke estis nur kata oro tio, kio nin tie supre blindigis, esti vidinta, ke la akcipitro nur estis griza ankaŭ sur sia dorso, ke estis pudro sur la delikata vango, kaj ke povis esti nigraj la randoj de la ungoj poluritaj, ke la naztuko estis malpura kvankam ĝi odoris parfumon — sed aliflanke turmentas min esti vidinta, ke tio al kies atingo mi klopodadis, estis nenio pli alta, pli solida; turmentas min vidi vin malleviĝinta tiel profunde, ke vi estas longe sub via kuiristino; tio turmentas min

kvazaŭ vidi la aŭtunajn florojn, kiujn disvipadas la pluvo kaj ŝanĝas en kotaĵon.

La fraŭlino Vi parolas, kvazaŭ vi estus jam mia superrangulo?

Jean Tia mi ankaŭ estas: sciu, mi povus igi vin grafino, sed vi neniam povos fari grafon el mi.

La fraŭlino Sed mi estas naskita de grafo, kaj tio vi neniam povos esti!

Jean Tio estas vera: sed mi povus naski grafojn, se —

La fraŭlino Sed vi estas ŝtelisto; tio ne estas mi.

Jean Ŝtelisto ne estas la plej malbona! Ekzistas pli malbona speco! kaj cetere: ĉar mi servas en iu domo, mi konsideras min iasence membro de la familio, kvazaŭ infano de la familio, kaj oni ne kalkulas kiel ŝtelon, ke la infanoj rabetas beron el plenaj arbetoj!

Lia pasio ekvekiĝas denove

Fraŭlino Julie, vi estas belega virino, tute tro bona por tia, kia mi estas! Vi estis kaptaĵo de deliro, kaj vi volas kaŝi la kulpon imagante al vi, ke vi min amas! Tion vi ne faras, se ne povas esti, ke mia eksteraĵo vin loĝas — kaj tiam via amo ne superas la mian — sed mi neniam kontentiĝos esti por vi la nura animalo, kaj vian amon mi neniam scios vekti.

La fraŭlino Ĉu vi estas certa pri tio?

Jean Vi volas diri, ke tio povos okazi! Ke mi povus ami vin, jes sen dubo: vi estas bela, vi estas bonedukita,
alproksimiĝas al ŝi kaj kaptas ŝian manon

klera, aminda kiom vi volas, kaj la flamo, kiun vi vekis en viro, kredeble neniam estingiĝos.

Metas la brakon ĉirkaŭ ŝian talion.

Vi estas kvazaŭ bruligita vino kun fortaj spicoj, kaj kiso de vi ...

Li provas konduki ŝin eksteren; sed ŝi liberigas sin malrapide.

La fraŭlino Lasu min! — Ne en tiu maniero vi min gajnos!

Jean Kiel do? — Ne en tiu maniero! Ne karesoj kaj belaj paroloj; ne prizorgo pri la estonteco, savo el malhonoro! Kiel do?

La fraŭlino Kiel? Kiel? Mi ne scias! — Nepre ne! — Mi abomenas vin same kiel mi abomenas musojn, sed mi ne povos forkuri de vi!

Jean Forkuru kun mi!

La fraŭlino *sin rektiĝas*

Forkuri? Jes, ni forkuru! — Sed mi estas tiel lacega! Donu al mi glason da vino!

Jean enverŝas vinon

La fraŭlino *ekrigardas sian horloĝeton*

Sed ni unue parolu; ni havas ankoraŭ iom da tempo.

Trinkas unu glason; prezentas la glason por ricevi pli.

Jean Ne trinku tiel malmodere, vi estos ebria!

La fraŭlino Kial tio estus grava?

Jean Kial tio estus grava? Estas malnoble ebriigi sin! — Kion vi intencis diri al mi nun?

La fraŭlino Ni forkuru! Sed ni unue parolu, tio estas: mi parolu, ĉar nur vi parolis ĝis nun. Vi rakontis vian vivon, nun mi volas rakonti mian, tiel ni konos unu la alian ĝisfunde, antaŭ ol ni komencos la migradon kune.

Jean Momenton! Pordonu! Pripensu, ĉu vi ne pentos poste, ke vi malzorge liveris la sekretojn de via vivo!

La fraŭlino Ĉu vi ne estas mia amiko?

Jean Jes kelkfoje! Sed ne fidu al mi.

La fraŭlino Tiel vi diras nur; — kaj cetere: miajn sekretojn konas, krome, ĉiu homo. — Sciu, mia patrino estis de nenobela deveno, io tre simpla. Ŝi estis edukita en la siatempaj instruoj pri sociala egaleco, pri la libereco de la virino kaj ĉio simila; kaj ŝi havis certan malemon al geedzeco. Tial, kiam mia patro edziĝopetis ŝin, ŝi respondis, ke ŝi neniam volas fariĝi lia edzino, sed ke ŝi povos fariĝi lia amantino. Li klarigis al ŝi, ke li ne volas, ke la virino, kiun li amis, ricevu malpli da respekto ol li mem. Al ŝia klarigo, ke la respekto de la ĉirkaŭa mondo ne gravis por ŝi, kaj influita de sia pasio, li akceptis ŝiajn kondiĉojn.

Sed per tio li estis forigita de sia kunularo kaj restis al li nur la hejma vivo, kiu ne povis kontentigi lin. Mi eniris la mondon — kontraŭ la deziro de mia patrino, laŭ kio mi povis kompreni. Do, mi estis edukita de mia patrino por esti infano de la naturo kaj krom tio mi lernis ĉion, kion knabo lernas, por ke mi estu ekzemplo de tio, ke virino egalvaloras al viro. Mi surhavis knabajn vestojn, lernis mastrumi ĉevalojn, sed ne la bovinejon; mi devis strigli kaj surmeti la

jungilaron kaj ĉasi, eĉ provi lerni la terkulturadon! En la bieno la virojn oni igis plenumi okupojn virinajn, kaj virinojn plenumi okupojn virajn — kun la rezulto, ke la bieno preskaŭ estis ruinigita, kaj ni ekestis ridindaĵo de la regiono. Fine mia patro ŝajnis vekigi el la ensorĉo, li ribelis, tiel ke ĉio estis ŝangita laŭ lia deziro. Mia patrino malsaniĝis — kiu malsano, tion mi ne scias — sed ŝi ofte havis konvulsiojn, kaŝis sin en la subtegmentejo kaj en la ĝardeno, kaj ŝi restis eksterdome la tutan nokton. Poste okazis la granda brulo, pri kiu vi aŭdis. La domo, la ĉevalejo kaj la bovinejo forbrulis, kaj tio en cirkonstancoj, kiuj vekis suspektojn pri vola bruligo, ĉar la malfeliĉo venis en la tago post la finiĝo de la asekura kvaronjaro kaj la premioj, kiujn estis ensendinta mia patro, malfruiĝis per la malzorgo de la transportanto, tiel ke ili ne alvenis ĝustatempe.

Ŝi plenigas la glason kaj trinkas.

Jean Ne trinku pli multe!

La fraŭlino Ho, ĉu tio gravas! — Ni estis sen hejmo kaj devis dormi en la veturiloj. Mia patro ne sciis, kie ricevi monon por la reconstruo de la domoj. Tiam la patrino proponis al li pruntepreni de amiko el ŝia juneco, brikfabrikisto en la proksimaĵo. La patro prunteprenis, sed ne bezonas pagi procentaĵon, kio mirigas lin. Kaj tiel la biendomoj estis rekonstruitaj!

Trinkas denove.

Ĉu vi scias, kiu forbruligis la biendomojn?

Jean Via patrino!

- La fraŭlino** Ĉu vi scias, kiu estis la brikfabrikisto?
- Jean** Ĉu la amanto de via patrino?
- La fraŭlino** Ĉu vi scias, kies estis la mono?
- Jean** Silentu iom — ne! tion mi ne scias?
- La fraŭlino** Ĝi estis de mia patrino!
- Jean** De la grafo, sekve, se ne estis dota kontrakto?
- La fraŭlino** Ne ekzistis dota kontrakto! — Mia patrino havis malgrandan bonhaston, kiun ŝi ne volis meti sub la mastromadon de mia patro, kaj tial ŝi deponis ĝin ĉe la amiko.
- Jean** Kiu ĝin pinĉis!
- La fraŭlino** Tute prave! Li ĝin retenis! — Tion ĉi ĉion mia patro eksciis; li ne povas procesi, ne povas repagi al la amanto de lia edzino, nek pruvi, ke estas la mono de la edzino! — Tio estis la venĝo de mia patrino, ĉar li ekprenis la regadon en la domo! Tiun fojon li pensis pafmortigi sin! — famoj ĉirkaŭkuris, ke li tion faris, sed malsukcesis! Sed li reviviĝas, kaj mia patrino devas punpagi siajn agojn! Kvin jarojn mi travivis, kaj imagu al vi kiajn! Mi simpatiis kun mia patro, sed mi tamen stariĝis por mia patrino, ĉar mi ne konis la cirkonstancojn. De ŝi mi lernis malfidon kaj malamon al la viroj — ĉar ŝi malamis la virojn, laŭ tio kion vi aŭdis — kaj mi ĵuris al ŝi neniam fariĝi sklavino de viro.
- Jean** Kaj vi fianĉiniĝis kun la regna vokto!
- La fraŭlino** Ĝuste tial, por ke li estu mia sklavo.
- Jean** Kaj tion li ne volis?

- La fraŭlino** Li volis sendube, sed ne estis permesite al li! Mi enuigis kun li!
- Jean** Mi vidis tion — en la ĉevaleja korto!
- La fraŭlino** Kion vi vidis?
- Jean** Kion mi vidis — kiamaniere li rompis la fianĉecon.
- La fraŭlino** Tio estas mensogo! Estis mi, kiu rompis! Ĉu li diris, ke estis li, la malnoblulo?
- Jean** Li certe ne estis ia malnoblulo? Ĉu vi malamas la virojn, fraŭlino?
- La fraŭlino** Jes! — Plej ofte! Sed kelkfoje — kiam la malforteco venas — ho fi!
- Jean** Ĉu vi malamas ankaŭ min?
- La fraŭlino** Senlime! Mi volus mortigi vin kiel beston ...
- Jean** Kiel oni rapidas pafmortigi rabian hundon. Ĉu ne?
- La fraŭlino** Jes, tiel!
- Jean** Sed nun ne aperas ilo por pafi — kaj ne aperas hundo! Kion ni do faru?
- La fraŭlino** Forvojaĝu!
- Jean** Por mortigi per turmentadoj unu la alian?
- La fraŭlino** Ne — por ĝuadi, du tagojn, semajnon, tiom longe kiom oni povas ĝui kaj poste — morti.
- Jean** Morti? Kia malsaĝaĵo! Mi tre preferas fondi hotelon!
- La fraŭlino** *ne aŭdante Jean-on*
— ĉe la lago de Como, kie konstante briladas la suno, kie la laŭroj verdas en Kristnasko kaj la orangĝoj varmrugĝas.

Jean La lago de Komo estas pluvnesto, kaj mi tie ne vidis oranĝojn ekster la spicobutikoj; sed ĝi estas bona loko por fremduloj, ĉar estas tie multe da somerdomoj luigataj al geamantoj, kaj tio estas tre profitodona industrio — ĉu vi scias kial? Ho, ili faras sian lukontrakton por duonjaro kaj tamen post tri semajnoj ili foriras!

La fraŭlino *naive*

Kial post tri semajnoj?

Jean Ili ekmalpacigiĝas, kompreneble! Sed la luprezon ili devas pagi malgraŭ ĉio. Kaj post tio oni luigas denove. Tiamaniere oni daŭrigas en senĉesa vico, ĉar la amo sufiĉas — kvankam ĝi ne longe daŭras!

La fraŭlino Ĉu vi ne volas morti kun mi?

Jean Mi ne volas morti, tute ne! Ĉar plaĉas al mi vivi, kaj ankaŭ ĉar memmortigo ŝajnas al mi krimo kontraŭ la Providenco, kiu donis al ni la vivon.

La fraŭlino Ĉu vi kredas al Dio, vi?

Jean Jes, certe mi kredas! Kaj mi iras al preĝejo ĉiun duan dimanĉon. — Sincere dirite, nun mi estas laca pri tio ĉi, kaj nun mi foriros por dormi.

La fraŭlino Jes ja, kaj vi pensas, ke mi restos kontenta kun tio? Ĉu vi scias, kion viro ŝuldas al virino, kiun li malvirgigis?

Jean *eltiras sian monujon kaj ĵetas sur la tablon arĝentan moneron*

Bonvolu! Mi ne volas ion ŝuldi!

- La fraŭlino** *ŝajnigante ne rimarki la insulton*
Ĉu vi scias, kion diras la leĝo ...
- Jean** Bedaŭrinde, la leĝo ne ordonas punon al virino, kiu delogas viron!
- La fraŭlino** *same kiel antaŭe*
Ĉu vi vidas alian rimedon, ol ke ni forvojaĝu, geedziĝu kaj eksedziĝu?
- Jean** Sed se mi rifuzas fari la mezaliancon?
- La fraŭlino** La mezaliancon ...
- Jean** Jes, mian! Sciu: mi havas pli bonrangan devenon ol vi, ĉar mi ne havas en mia paren caro bruligistino!
- La fraŭlino** Ĉu vi povas certi, ke ne?
- Jean** Vi ne povas certi pri la malo, ĉar ni ne starigas genealogian registron — krom ĉe la polico! Sed pri via genealogio mi legis en libro sur la tablo de la salono. Ĉu vi scias, kiu estis via fonda patro? Li estis muelisto, ĉe kies edzino la reĝo dormis unu nokton dum la dana milito. Tiajn praulojn mi ne havas! Mi tute ne havas praulojn, sed mi mem povos fariĝi praulo!
- La fraŭlino** Jen la rekompenco por tio, ke mi malfermis mian koron al malindulo, ke mi donis la honoron de mia familio ...
- Jean** La malhonoron! — Jen ja, mi avertis vin! Oni ne trinku, ĉar tiam oni babilas! Kaj oni ne rajtas babili!
- La fraŭlino** Ve, kiom mi pentas! — Kiom mi pentas! — Kaj se vi almenaŭ amus min!
- Jean** Lastafoje — kion vi volas diri? Ĉu mi devas plori, ĉu

mi devas transsalti rajdvipon, ĉu mi devas kisi vin, logi vin kuniri al la lago de Komo por tri semajnoj kaj poste ... kion mi devas? kion vi volas? tio ĉi komencas esti turmenta! Sed tiel estas, kiam oni metas sian nazon en virinajn aferojn! Fraŭlino Julie! Mi vidas, ke vi estas malfeliĉa, mi scias, ke vi suferas, sed mi ne povas kompreni vin. Ni aliaj ne kondukas tiel strange; ni ne havas malamon inter ni! Ni amas kiel en ludo, kiam la laboro lasas al ni tempon; sed ni ne havas tempon por tio la tutan tagon kaj la tutan nokton kiel vi! Mi konsideras vin malsana; certe vi estas malsana.

La fraŭlino Estu bona al mi; kaj nun vi parolas kiel homo.

Jean Jes, sed estu homo mem! Vi kraĉis sur min kaj vi ne permesas, ke mi sekigu min — sur vin!

La fraŭlino Helpu min, helpu min; diru nur, kion mi faru — kien mi rifuĝu?

Jean En la nomo de Jesuo, se mi scius mem!

La fraŭlino Mi estis furiozanta, mi estis freneza, sed ĉu ne ekzistas iaspeca savo!

Jean Restu kaj kvietiĝu! Neniu scias ion.

La fraŭlino Neeble! La bienanaro scias tion kaj Kristin scias tion!

Jean Ili ne scias, kaj ili neniel povus kredi ion similan!

La fraŭlino *malrapidiĝe*

Sed, — povos okazi aukoraŭ unu fojon!

Jean Tio estas vera!

La fraŭlino Kaj la sekvoj?

Jean *timigita*

La sekvoj! — Kie mi havis mian kapon, ke mi ne pensis pri tio? Jes, tiakondiĉe ekzistas nur unu maniero — malaperi! Tuj! Mi ne akompanos vin, ĉar tiel ĉio estos perdita, sed vi devas forvojaĝi sola — for— kien ajn!

La fraŭlino Sola? Kien? — Tion mi ne povas!

Jean Vi nepre devas! Kaj jam antaŭ ol la grafo revenos! Se vi restos, vi scias, kiel fariĝos! Se unu fojon oni pekis, oni volas daŭrigi, ĉar la misfaro jam estas farita — Tiel oni prenas pli kaj pli da riskoj — kaj fine oni troviĝas malkovrita! Sekve, forvojaĝu! Skribu poste al la grafo kaj ĉion konfesu, escepte ke estis mi! Kaj tion li neniam povos diveni! Kaj mi ne pensas, ke li ne estos tro fervora ekscii tion!

La fraŭlino Mi forvajaĝos, se vi kuniros!

Jean Ĉu vi estas freneza, homo? Fraŭlino Julie forkurus kun sia lakeo! Tion oni legus en la gazetoj postmorgaŭ kaj tion la grafo neniel postvivus!

La fraŭlino Mi ne povas forvojaĝi! Mi ne povas resti! Helpu min! Mi estas laca, tiel senlime laca. Ordonu al mi! Moviĝu min, ĉar mi ne povas pensi plu, ne povas agi plu!

Jean Jen vi vidas, kia malindulino vi estas! Kial vi parolas fierajn vortojn kaj levas alte vian nazon, kvazaŭ vi estus la mastro de la kreitaĵaro! Nu: mi ordonos al vi! Iru supren en vian ĉambron kaj vestu vin; provizu vin per vojaĝmono kaj revenu ĉi tien!

La fraŭlino *duonlaŭte*

Akompanu min supren!

Jean En vian ĉambron? — Nun vi estas freneza denove! —

Ŝanceliĝas dum momento

Ne! Iru tuj!

Kaptas ŝian manon kaj elkondukas ŝin.

La fraŭlino *irante*

Parolu tamen afable al mi, Jean!

Jean Ordono ĉiam sonas malafabla; provu! Provu!

Jean *sola; elpuŝas ekĝemon de malembarasiĝo; sidiĝas apud la tablo; elprenas notkajeron kaj krajonon; kalkulas laŭte de tempo al tempo; senparola mienludado, ĝis kiam Kristin eniras vestita por iri al preĝejo, portante en la mano ĉemizbrustumon kaj blankan kravaton.*

Kristin Sinjoro Jesuo, kiel aspektas ĉi tie! Kion vi entreprenis?

Jean Ha, estas tiel, ke la fraŭlino entiris la bienanaron. Ĉu vi dormis tiel profunde, ke vi nenion aŭdis?

Kristin Mi dormis kvazaŭ trabo!

Jean Kaj jam vestita por iri al preĝejo?

Kristin Je-es! Vi ja promesis al mi, ke vi akompanos min hodiaŭ al komuniĝo!

Jean Ho jes, tio estas ja vera, mi forgesis! — Kaj jen vi alportas la ceremonian vestornamaĵon! Nu, venu do!
Sidiĝas; Kristin komencas survesti al li la brustumon kaj la blankan kravaton. Paŭzo.

- Jean** *dormeme*
Kiu evangelio estas hodiaŭ?
- Kristin** Estas pri Johano Baptisto senkapigata, mi pensas!
- Jean** Tio estos sendube terure longa! — Aj, vi sufokas min!
— Ho, mi estas tre dormema, tre dormema!
- Kristin** Jes, kion li faris maldormante la tutan nokton; vi estas ja tute verda en la vizaĝo!
- Jean** Mi sidis ĉi tie kaj babilis kun fraŭlino Julie.
- Kristin** Ŝi ne scias, kio konvenas, tiu kreitaĵo!
Paŭzo
- Jean** Aŭdu Kristin!
- Kristin** Nu-u?
- Jean** Estas ĉiuokaze strange, se oni pripensas.
- Kristin** Kio estas stranga?
- Jean** Ĉio kune!
Paŭzo
- Kristin** *rigardas la glasojn kiuj staras duone malplenigitaj sur la tablo*
Ĉu vi ankaŭ trinkis kune?
- Jean** Jes!
- Kristin** Fi! — Rigardu en miajn okulojn!
- Jean** Jes!
- Kristin** Ĉu estas eble? Ĉu estas eble?
- Jean** *post pripenso*
Jes! Estas!

- Kristin** Uŝ! Tion tamen mi neniam povus kredi! Ne, fi! fi!
- Jean** Vi ne estas jaluza al ŝi, ĉu?
- Kristin** Ne, ne al ŝi! Se estus Klara aŭ Sofi; tiam mi elŝiras viajn okulojn! Jes, tiel estas kaj restas; la kaŭzon mi ne konas. Ne, tio estas abomeninda!
- Jean** Ĉu vi estas kolera al ŝi, do?
- Kristin** Ne, sed al vi! Estis malbona faro! Tre malbona! La kompatinda knabino! — Ne! vere mi diras! mi neniel volas resti plu en tiu ĉi domo, kiam oni ne povas respekti siajn gemastrojn.
- Jean** Kial oni devas ilin respekti?
- Kristin** Ho jes, klarigu tion, vi kiu estas tiel ruza! Sed sendube vi ne volas servi al homoj, kiuj kondutas tiel maldece? Ĉu ne vere? Oni malhonoras sin mem per tio, mi pensas.
- Jean** Jes, sed estas ja konsolo por ni, ke la aliaj tute ne estas pli bonaj ol ni!
- Kristin** Ne, tion mi ne opinias; ĉar se ili ne estas pli bonaj, tiam ne estas ideo klopodi fariĝi pli bonaj homoj. — Kaj pensu pri la grafo! Pensu pri li, kiu havis tiom da ĉagreno en sia vivo! Ne, mi ne volas resti plu en tiu ĉi domo! — Kaj kun tia kiel vi! Se estus la regna vokto; se estus ia plialtulo...
- Jean** Kion?
- Kristin** Ja-ja! Vi estas sendube bona, sed estas diferenco inter homoj kaj homoj, ĉiuokaze. — Ne, tion mi neniam povos forgesi. — La fraŭlino, kiu estis tiel fiera, tiel akra al viroj, ke oni neniam volis kredi ke ŝi fordo-

nos sin — kaj al tiaspeculo! Ŝi kiu preskaŭ pafmortigis Dianan, la kompatindan, ĉar ŝi kuris kun la mopso de la barilgardisto! — Jes, mi diras! — Sed ĉi tie mi ne volas resti plu, kaj la dudek kvaran de oktobro mi foriros.

Jean Kaj poste?

Kristin Jes, ĉar ni ektuŝis tiun temon: povus esti taŭga tempo serĉi ion, ĉar ni ĉiukaze geedziĝos.

Jean Nu, kion mi serĉu? Tian oficon mi ne povos ricevi kiel edzo.

Kristin Ne, tio estas evidenta! Vi ja povus akcepti oficon kiel pordisto, aŭ peni eniron kiel pedelo en iun oficejon. La regna pano estas apenaŭ sufiĉa, sed ĝi estas certa, kaj edzino kun infanoj ricevas pension ...

Jean *grimacante*

Estas tre bone tio, sed ne estas laŭ mia prefero tuj pripensi morti por edzino kaj infanoj. Mi devas konfesi, ke mi tamen celis iom pli alten.

Kristin Nu, viaj celadoj! Vi ankaŭ havas devojn. Pripensu ilin!

Jean Ne incitu min per parolo pri devoj, mi sen tio bone scias, kio estas mia farotaĵo!

Aŭskultas eksteren

Pri tio ni tamen havas sufiĉan tempon mediti. Eniru nun kaj preparu vin por iri al la preĝejo.

Kristin Kiu promenadas supre?

Jean Mi ne scias. Eble estas Klara.

- Kristin** Ĉu povas esti la grafo, kiu revenis hejmen, sen ke ni aŭdu lin?
- Jean** *timante*
La grafo? Ne, tion mi ne povas kredi, li tiam certe so-
norigus.
- Kristin** *eliras*
Nu, Dio nin helpu! Neniam mi spertis ion similan.
*La suno ĵus leviĝis kaj brilas sur la suproj de la parkaj
arboj; La lumo moviĝas iom post iom, ĝis ĝi eniras
malrekte tra la fenestroj*
- Jean** *iras al la pordo kaj faras signon.*
- La fraŭlino** *eniras vestita por vojaĝo kaj portas birdan kaĝon, kov-
ritan per tuko, kiun ŝi metas sur seĝon.*
Jen mi estas preta.
- Jean** Silentu! Kristin vekiĝis!
- La fraŭlino** *la sekvanton nervozege*
Ĉu ŝi ion suspektas?
- Jean** Ŝi nenion scias! Sed, Dio mia, kian aspekton vi havas!
- La fraŭlino** Kiel? Mia aspekto?
- Jean** Vi estas pala kiel mortinto kaj — pardonu, vi estas
malpura sur la vizaĝo.
- La fraŭlino** Lasu min do lavi min! Tiel!
Ŝi iras al la lavujo kaj lavas la vizaĝon kaj manojn.
Donu al mi viŝtukon! — Ah, estas la suno, kiu leviĝas!
- Jean** Kaj tiam kreas la monstro.

La fraŭlino Jes, estas la monstroj kiuj rajdis ĉi-nokte! — Sed, Jean, aŭskultu min! Akompanu min, ĉar nun mi havas rimedojn!

Jean *dubante*
Ĉu sufiĉe?

La fraŭlino Sufiĉe por la komenco! Akompanu min, ĉar hodiaŭ mi ne povas veturi sola. Pensu, la somermeza festotago, en malfreŝaera vagono, enpakita en homamaso, kiu rigardados; halti ĉe la stacioj, kiam oni volas flugi. Ne, mi ne povas, mi ne povas! Kaj poste venas la memoroj; la infanaĝaj memoroj de somermezaj tagoj kun la preĝejo foliornamita — betulfoliaro kaj siringoj; la tagmanĝo kun la tablo preparita, la parencoj, la amikoj; la posttagmezo en la parko, danco, muziko, floroj kaj ludoj. Ho! oni forkuras, forkuras, sed la memoroj sekvas en la pakvagono, kaj la pento kaj la konsciencaj doloregoj!

Jean Mi akompanos vin — sed tuj, antaŭ el estos tro malfrue. Tuj en ĉi tiu momento!

La fraŭlino Surmetu do la eksterajn vestaĵojn!
Prenas la birdokaĝon

Jean Sed neniu pakaĵo! Tiam ni estos trovitaj!

La fraŭlino Ne, neniu! Nur tiom, kiom oni povas havi en la kupeo.

Jean *prenis sian ĉapelon*
Kion vi havas tie? Kio estas?

La fraŭlino Estas nur mia fringelo. Ĝin mi ne volas postlasi!

- Jean** Jen ankoraŭ! Ni eĉ kunportos birdokaĝon! Vi ja estas freneza! Lasu la kaĝon!
- La fraŭlino** La sola propraĵo, kiun mi kunportas el la hejmo; la sola vivanta estaĵo, kiu min amas, post kiam Diana fariĝis al mi malfidela! Ne estu kruela! Permesu al mi ĝin kunporti!
- Jean** Lasu la kaĝon, mi diras, — kaj ne parolu tiel laŭte — Kristin povus nin aŭdi.
- La fraŭlino** Ne, mi ne lasas ĝin en fremdaj manoj! Mortigu ĝin prefere!
- Jean** Donu al mi la bestetaĉon, mi ĝin senkapigos!
- La fraŭlino** Jes, sed ne dolorigu ĝin! Ne — ne, mi ne povas!
- Jean** Donu; mi povas!
- La fraŭlino** *Prenas la birdon el la kaĝo kaj kisas ĝin.*
Ho, mia eta Serine, ĉu vi mortos nun pro via mastri-
no?
- Jean** Bonvolu ne aranĝi scenojn; ja koncernas vian vivon, vian bonstaton! Jen, rapidu!
*Tiras la birdon el ŝiaj manoj, portas ĝin al la ligna ŝti-
po kaj prenas la kuirejan hakilon.*
- La fraŭlino** *sin turnas for*
- Jean** Vi devus esti lerninta buĉi kokidojn anstataŭ pafi per revolvero —
ekhakas
— tiam vi ne svenus pro guto de sango!
- La fraŭlino** *krias*
Mortigu ankaŭ min! Mortigi min! Vi kiu povas buĉi

senkulpan beston sen mantremo. Ho, mi malamas kaj abomenas vin; inter ni estas sango! Mi malbenas la momenton, kiam mi vin vidis, mi malbenas la momenton, kiam mi ricevis vivon en mia patrino!

Jean

Nu, por kio estas utila malbeno! Iru!

La fraŭlino

alproksimiĝas al la ŝtupo kvazaŭ altirita kontraŭ sia volo

Ne, mi ankoraŭ ne volas iri; mi ne povas — mi devas vidi — silenton! veturilo venas ekstere —

aŭskultas eksteren, dum ŝi fiksas la okulojn sur la lakeon kaj la hakilon

Vi kredas, ke mi ne povas rigardi sangon! Ĉu vi supozas, ke mi estas tiel malforta ... Ho — mi volus vidi vian sangon, vian cerbon sur hakŝtupo — mi volus vidi tutan vian sekson naĝi en lago kiel tiu — mi kredas, ke mi povus trinki el via kranio, mi volus bani miajn piedojn en via brusta kavo, kaj mi povus manĝi vian koron rostitan! — Vi kredas, ke mi estas malforta; vi kredas, ke mi vin amas, ĉar mia ovo sopiregis vian semon; vi kredas, ke mi volas porti vian idon sub mia koro kaj nutri ĝin per mia sango — naski vian infanon kaj akcepti vian nomon! Jen, kio estas via nomo? mi neniam aŭdis vian familian nomon — supozeble vi nenian havas. Mi fariĝus sinjorino "Pordistdomaĉo" aŭ madamo "Balaaĵejo" — vi, hundo, kiu portas mian kolĉenon, vi lakeo, kiu portas mian familian insignon sur viaj butonoj — mi dividus vin kune kun mia kuiristino, konkurus kun mia servistino! Ho, ho, ho — vi kredas, ke mi estas timema kaj volas forkuri! Ne, nun mi restos — kaj poste tondru! Mia patro venas — tro-

vos sian komodon rompita — ke sia mono estas for!
 Jen li sonorigos per tiu sonorilo — dufoje por sia ser-
 visto kaj poste ordonos venigi la policestron — kaj
 tiam mi ĉion rakontos! Ĉion! Ho estos agrable atingi
 finon — ke nur la fino venu! — Kaj poste lin frapos
 apopleksio kun morto! — Tiel la fino nin trafos ĉiu-
 jn — poste venos la trankvilo — la ripozo! — la eter-
 na ripozo! — Tiel la blazono frakasiĝos sur la ĉerko —
 la grafa gento estingiĝos kaj la lakea gento daŭrigos
 en domo por sennomaj infanoj — ricevos laŭran kro-
 non en strata defluilo kaj finos en malliberejo!

Jean Jen parolas la reĝa sango! Brave, fraŭlino Julie! Enŝ-
 topu nun ankaŭ la mueliston en la sakon!

Kristin *eniras preĝejvestita kun psalmolibro en la mano*

La fraŭlino *rapide iras renkonte al ŝi kaj falas en ŝiajn brakojn kva-
 zaŭ por serĉi ŝirmon.*

Helpu min, Kristin! Helpu min kontraŭ tiu viro!

Kristin *senmova kaj malvarma*

Kia spektaklo nun estas en la festotaga mateno!
rigardas la ŝtipon

Kiel vi malpurigis tie ĉi! — Kion signifas tio ĉi? Kaj
 kiel vi krias kaj bruegas!

La fraŭlino Kristin! Vi estas virino kaj vi estas amika al mi! Gar-
 du vin kontraŭ tiu malnoblulo!

Jean *iom timema kaj embarasita*

Dum la fraŭlinoj rezonas mi foriros por min razi!
Elglitas dekstren

- La fraŭlino** Vi min komprenos; kaj vi devos min aŭskulti!
- Kristin** Ne, mi vere ne komprenas tiajn malĉastaĵojn! Kien vi pensas iri vestita por vojaĝo — kaj li staras kun la ĉapelo sur la kapo — Kio? — Kio? —
- La fraŭlino** Aŭskultu min, Kristin; aŭskultu min, mi ĉion malkaŝos —
- Kristin** Mi ne volas ion scii —
- La fraŭlino** Vi nepre aŭskultu min —
- Kristin** Pri kio temas? Ĉu estas pri la malsaĝaĵoj kun Jean? Pri tio mi ne zorgas, ĉar ne estas mia afero. Sed se ŝi celas logi lin forkuri, mi metos punkton al tio!
- La fraŭlino** *treege nervoze*
Penu nun esti trankvila kaj aŭskultu. min! Mi ne povas resti ĉi tie kaj Jean ne povas resti ĉi tie — ni devas forveturi.
- Kristin** Hm, hm!
- La fraŭlino** *sereniĝas*
Jen, mi ekhavis ideon — se ni veturus triope eksterlanden — al Svisujo por aranĝi hotelon kune — mi havas monon, vi komprenas — Jean kaj mi estrus la tuton — kaj vi, mi pensas, prenus sur vin la kuirejon — Ĉu ne estos bonege! — Diru nun jes! Kaj venu kun ni, por ke ĉio estu preta! — — Diru do jes!
ĉirkaŭprenas Kristinon kaj karesas ŝin
- Kristin** *malvarma kaj pensema*
Hm, hm!

La fraŭlino *presto tempo*

Vi neniam estis eksterlande en vojaĝo, Kristin — vi foriros por vidi la mondon. Vi tute ne povas supozi, kiel plezure estas vojaĝi per vagonaro — senĉese novaj homoj — novaj landoj — kaj jen ni alvenos al Hamburgo kaj vidos la zoologian ĝardenon preterpasante — tion plaĉos al vi — kaj poste ni iros en teatron por aŭdi operon — kaj kiam ni venos al Munkeno estos tie la muzeoj, kaj tie estas Rubens kaj Rafaelo, la grandaj pentristoj. Vi ja aŭdis pri Munkeno, kie la reĝo Ludoviko loĝis — la reĝo, vi scias, kiu freneziĝis — kaj jen ni vidos lian palacon — li havas ankoraŭ palacojn, kiuj estas faritaj kiel en la fabeloj — kaj de tie ne estas malproksime al Svisujo — kun la Alpoj — imagu al vi la Alpojn neĝokovritaj dum somermezo — kaj tie kreskas oranĝoj kaj laŭroj, kiuj estas verdaj la tutan jaron —

Jean vidiĝas en la dekstra kuliso, akriĝanta sian razilon per rimeno, kiun li tenas inter la dentoj kaj la maldekstra mano; aŭskultas kontenta la interparoladon kaj kapobalancetas konsente iom post iom.

La fraŭlino *tempo prestissimo*

— Kaj tie ni aranĝos hotelon — kaj mi sidos en la kontoro, dum Jean akceptas la vojaĝantojn — eliras por aĉeti — skribas leterojn — jen estas vivo, vi vidos — jen signalas la vagonaro, jen venas la omnibuso, jen sonoriĝas en la ĉambraro, jen sonoriĝas en la restoracio — kaj mi skribos la kalkulojn — kaj ni povos ilin salumi. — Vi tute ne povas imagi, kiel timemaj

estas la vojaĝantoj, kiam ili pagas la kalkulon! — Kaj vi — vi sidos kiel mastrino en la kuirejo. — Kompreneble vi ne mem staros ĉe la forno — kaj vi devos esti belete kaj delikate vestita, kiam vi aperos antaŭ la gastoj — kaj vi kun via eksterajaĵo — jes mi ne flatas vin — vi certe povas kapti viron ĉe okazo! riĉan anglon, vi komprenas — tiajn homojn oni facile

malrapidiĝas

kaptas — kaj poste ni riĉiĝos — kaj konstruos kampodomon ĉe la lago de Komo — tie ja iom pluvos okaze — sed

malfortiĝas

la suno ja ankaŭ brilos kelkfoje — kvankam nun estas mallume — kaj — poste ja alie ni ja povos reveturi hejmen — kaj reveni

paŭzo

— ĉi tien aŭ aliloken —

Kristin Nu! Ĉu vi fraŭlino mem kredas ĉion tion?

La fraŭlino *neniigita*

Ĉu mi mem kredas?

Kristin Jes!

La fraŭlino *laca*

Mi ne scias; mi ne plu kredas je io.

Ŝi falas sur la benkon; metas la kapon inter la brakoj sur la tablo

Nenio! Tute nenio!

- Kristin** *sin turnas dekstren, kie estas Jean.*
Tiamaniere! Vi pensis forkuri!
- Jean** *honteta, metas la razilon sur la tablon*
Forkuri? Estas iom tro aserti tion! Vi ja aŭdis la projekton de la fraŭlino, kaj kvankam ŝi nun estas laca post la nokta maldormo, tiu projekto tre bone povas efektiviĝi!
- Kristin** Atentu! Ĉu vi intencis, ke mi fariĝu kuiristino ĉe tiu individuo ...
- Jean** *akre*
Volu uzi edukitan esprimon, kiam vi parolas al via mastrino! ĉu komprenita!
- Kristin** Mastrino!
- Jean** Certe!
- Kristin** Aŭdu tamen! Aŭskultu lin!
- Jean** Jes, aŭskultu, tion vi certe bezonas, kaj babilu iom malpli! Fraŭlino Julie estas via mastrino kaj la sama afero, kiu igas vin malestimi ŝin, devus igi vin malestimi vin mem!
- Kristin** Mi ĉiam havis tiom da estimo por mi mem —
- Jean** — ke vi povis aliajn malestimi! —
- Kristin** — ke neniam mi malaltigis min sub mian rangon. Diru, ke la grafa kuiristino havis ian interligon kun la ĉevala purigisto aŭ la porkisto! Diru tion!
- Jean** Ja, vi havis aferon kun noblamaniera viro, vi havis bonŝancon!

- Kristin** Noblamaniera viro, kiu vendas la avenon de la grafo el la ĉevalejo —
- Jean** Pri tio vi parolu, vi kiu akceptas procenton de la spicisto kaj kiu lasas vin subaĉeti de la buĉisto!
- Kristin** Kio?
- Jean** Kaj vi ne povas plu havi respekton por viaj gemastroj! vi, vi, vi!
- Kristin** Ĉu vi nun kuniros al la preĝejo? Vi bezonas bonan predikon post via heroaĵo.
- Jean** Ne, mi ne iros al la preĝejo hodiaŭ; vi iru sola por konfesi viajn agojn!
- Kristin** Jes, tion mi faros, kaj mi revenos kun pardono, tiom ke sufiĉos ankaŭ por vi! Nia Savinto suferis kaj mortis sur la kruco por ĉiuj niaj pekoj, kaj se ni venas al li kun kredo kaj kun animo pentanta, li prenas sur sin nian tutan ŝuldon.
- La fraŭlino** Ĉu vi tion kredas, Kristin?
- Kristin** Estas mia viva kredo envere, kaj estas mia infaneca kredo, kiun mi konservis el mia juneco, fraŭlino Julie. Kaj tie kie la peko superfluas, tie ankaŭ superfluos la pardono!
- La fraŭlino** Ho, se mi havus vian kredon! Ho, se —
- Kristin** Jes, sed tion oni ne povas ricevi sen aparta favoro de Dio, kaj ne al ĉiuj ĝi estas donita.
- La fraŭlino** Kiuj do ĝin ricevas?
- Kristin** Tio estas la granda sekreto de la pardona ago, kaj Dio

ne donas preferon al tiu aŭ alia persono, sed la plej malgrandaj fariĝos altranguloj —

La fraŭlino Jes, sed tiam li donas preferon al la plej malgrandaj?

Kristin *daŭrigas*

— kaj estas pli facile por kamelo trairi la trueton de kudrilo ol veni en la regionon de Dio! Tiel estas, fraŭlino Julie!

Nun mi tamen iras — sola, kaj preterpasante mi ordonos al la ĉevalisto, ke li ne ellasu ĉevalojn, se iu volus veturi antaŭ la reveno de la grafo! — Adiaŭ!

foriras

Jean Kia diablo! — Kaj ĉio tio pro fringelo! —

La fraŭlino *malvigla*

Lasu la fringelon! Ĉu vi vidas eliron el ĉi tio, finon de ĝi?

Jean *meditas*

Ne!

La fraŭlino Kion vi farus en mia situacio?

Jean En via? Atendu? — Kiel nobela, kiel virino, kiel — malvirta. Mi ne scias — Jes! Nun mi scias!

La fraŭlino *prenas la razilon kaj faras geston*

Ĉu tiel?

Jean Jes! — Sed mi ne farus tion — rimarku! ĉar estas diferenco inter ni!

La fraŭlino Ĉar vi estas viro kaj mi virino? Kia diferenco do estas?

Jean La sama diferenco — kiel — inter viro kaj virino!

La fraŭlino Mi volas! Sed mi ne povas! — Mia patro ankaŭ ne povis je tiu okazo, kiam li devus tion fari.

Jean Ne, li ne devis tion fari! Li devis unue venki!

La fraŭlino Kaj nun mia patrino denove venĝas, pere de mi.

Jean Ĉu vi ne amas vian patron, fraŭlino Julie?

La fraŭlino Jes, senlime, sed mi eble lin ankaŭ malamis! Mi supozeble tion faris nerimarkite! Sed estas li, kiu min edukis al malestimo de mia propra sekso, al duonvirino kaj duonviro! Kies estas la kulpo pri tio, kio fariĝis? De mia patro, de mia patrino, de mi mem! De mi mem? Mi ja nenion propran havas? Mi ne hasas iun penson, kiun mi ne ricevis de mia patro, iun pasion, kiun mi ne ricevis de mia patrino, kaj la lasta — ke ĉiuj homoj estas samaj — tion mi ricevis de li, mia fianĉo — kiun mi tial nomas mizerulo! Kiel tio povas esti mia propra kulpo? Transmeti la ŝuldon sur Jesuon, kiel Kristin faris — ne, por tio mi estas tro fieraj kaj tro saĝa — dank'al la instruoj de mia patro — kaj ke riĉulo ne povas eniri en la ĉielon tio estas malvero, kaj Kristin, kiu posedas monon en la ŝparbanko, almenaŭ ne envenos tien! Kies estas la ŝuldo? Ĉu nin koncernas, kies estas la ŝuldo! Tamen estas mi, kiu portos la ŝuldon, portos la sekvojn!

Jean Jes, sed —

sonoriĝas akre du fojon en la sonorilo. La fraŭlino ek-saltas; Jean ŝanĝas surtuton

Jean La grafo estas hejme! Imagu, se Kristin —
iras al la paroltubo; frapetas kaj aŭskultas

La fraŭlino Ĉu li estis ĉe la komodo?

Jean Estas Jean, sinjoro grafo!

aŭskultas: Atentu: la rigardanto ne aŭdas, kion diras la grafo

Jes, sinjoro grafo!

aŭskultas

Jes, sinjoro grafo! Tuj!

aŭskultas

Tuj, sinjoro grafo!

aŭskultas

Jes! Post duona horo!

La fraŭlino *timegigita*

Kion li diris? Pro Jesuo, kion li diris?

Jean Li ordonis siajn botojn kaj sian kafon post duonhoro.

La fraŭlino Sekve post duona horo! Ho, mi estas tiel laca; mi ne nion povas, ne povas penti, ne forkuri, ne resti, ne vivi — ne morti! Helpu nun al mi! Ordonu al mi, kaj mi obeos kiel hundo! Faru por mi la lastan servon, savu mian honoron, savu lian nomon! Vi scias, kion mi volus, sed ne volas. Volu tion, vi, kaj ordonu al mi tion fari!

Jean Mi ne scias — sed nun ankaŭ mi ne povas — mi ne komprenas — Estas tiel, ke tiu ĉi surtuto kaŭzas, ke mi ne povas ordoni al vi — kaj nun, post kiam la grafo parolis al mi — mi ne ĝuste povas klarigi tion, sed — oh, estas la diabla servisto, kiu troviĝas en mia dor-

so! — mi kredas, ke se la grafo nun venus — kaj ordonus al mi tranĉi mian kolon, mi tion tuj farus!

La fraŭlino Ŝajnigu do, ke vi estas li kaj ke mi estas vi! — Vi ja povis antaŭ momento ludi tiel bone, kiam vi genufleksis — tiam vi estis la nobelulo — aŭ — ĉu vi neniam estis en la teatro kaj vidis la magnetiziston? —

jesa gesto de Jean

— Li diras al la subjekto: prenu la balailon; li ĝin prenas; li diras: balau, kaj ĝi balaas —

Jean Tiam do la alia devas dormi!

La fraŭlino *ekstaze*

Mi jam dormas — la tuta ĉambro estas por mi kiel fumo — kaj vi ŝajnas esti fora forno — kiu similas al nigre vestita viro kun altforma ĉapelo — kaj viaj okuloj brilas kiel la karboj, kiam la fajro estingiĝas — kaj via vizaĝo estas blanka makulo kiel estingiĝinta cindro —

La sunlunto envenis sur la plankon kaj lumas sur Jean

— estas tiel varme kaj bone —

Ŝi frotetas la manojn kiel se ŝi ilin varmigis antaŭ fajro

— kaj tiel lume kaj tiel kviete!

Jean *prenas la razilon kaj metas en ŝian manon*

Jen la balailo! Iru nun dum estas lume — for en la fojnejon — kaj ...

murmuretas en ŝian oreilon

La fraŭlino *vekigita*

Dankon! nun mi iras al la ripozo! Sed diru nur, ke la superuloj ankaŭ povas ricevi la donacon de la dia pardono. Diru tion, ankaŭ se vi ne kredas.

Jean La superuloj? Ne, tion mi ne povas! Sed atendu — fraŭlino Julie — nun mi scias! Vi ja ne estas jam inter la superuloj — kiam vi estas inter — la lastaj!

La fraŭlino Estas vere. — Mi estas inter la plej lastaj; mi estas la lasta el ĉiuj! Ho! — Sed nun mi ne povas iri — Diru ankoraŭ unu fojon, ke mi iru!

Jean Ne, nun ankaŭ mi ne povas! Mi ne povas!

La fraŭlino Kaj la superuloj fariĝos la plej malsupraj!

Jean Ne pensu, ne pensu! Vi ja prenas ĉiun mian povon ankaŭ de mi, tiel ke mi fariĝas malkuraĝa — Kio! ŝajnis al mi, ke la sonorilo moviĝas! — Ne! Ĉu ni metu paperon en ĝin! — Tiel timi sonorilon! — Jes, sed ne estas nur sonorilo — iu sidas malantaŭ ĝi — mano movigas ĝin — kaj io alia movigas la manon, sed ŝirmu la orelojn per la manoj — ŝirmu ilin! Ja, tiam li sonorigas ankoraŭ pli forte, sonorigos ĝis oni respondos — kaj tiam estos tro malfrue kaj poste venos la policestro kaj poste —

Du fortaj sonorigoj

Jean *subenfalas; poste li sin rektigas*

Estas terure! Sed alia fino ne ekzistas! Iru!

La fraŭlino *iras decide for tra la pordo*

Kurteno

www.omnibus.se/inko

ISBN 91-7303-081-3